

Aŭstraliaj Esperantistoj



Novajletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale

PLENUMITA 01/10/2020 Kvarcentnaŭdekoka eldono (unua eldono 20/09/2011)



Subtenu vian Novajleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

Uzindaj ligoj [reta-vortaro](#) [Freelang Vortaro](#) [Plena Ilustrita Vortaro](#) [Duolingo](#)

[Google Translate](#) [Pasintaj AE eldonoj](#) [duolingo entute](#) [lingvohelpilo](#)

[Esperanta Retradio](#) [Esperanta himno](#) [PMEGramatiko](#) [openclipart](#)

Oni povas meti sian nomon, retadreson, urbon kaj landon al la listo de ricevantoj. rspring@tpg.com.au



Entute **746,800** lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo



Nun studas **288,000** lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)

Nun studas **226,000** lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)

Nun studas **212,000** lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018)

Nun studas **20,800** lernantoj per la franca lingvo. (Ekde julio 2020)


Nun preparas Esperantan programon por ĉinoj. (Ekde novembro 2020?)



(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917)

EKSTRAĴOJ ĈE LECIONO 4 DE "THE ESPERANTO-TEACHER" (de Mason Stuttard).

N.ro 4 de "Por Komencantoj".



Esperanto, kiel la aliaj eŭropaj lingvoj, ekzistas el grupoj da vortoj. La vortoj de ĉiu tia grupo apartenas kune, kaj diras iun okazon. La grupo nomiĝas frazo, aŭ gramatike "propozicio", kaj kreas bildon, en kiu la partoj de la okazo (= *parts of speech*) estas montrataj en tempa sekvo de la okazo. En la skribata lingvo tiu sekvo de la partoj iras de maldekstre al dekstre, ekz. "La knabino lavas la ŝtonon (sur la marbordo)". En tia lingva bildo oni unue montras la knabinon, ĉar ŝi estas la plej grava en la bildo.

Post tio la frazo montras kion la knabino faras, nome ŝi "lavas". Por kompletigi la bildon, la frazon, la lingvo kelkfoje mencias la aferon kiu "sentas", aŭ ricevas, la efikon de la ago de lavado, nome la ŝtonon. En la lingvo kaj en la bildo ni do vidas aŭ aŭdas la okazon en tiu sisekvo, ĉar nia menso povas vidi la okazon nur en sisekvo, ne ĉion kune. En la gramatiko ni nomas la unuan parton la Subjekto ("la knabino"), la duan parton la Verbo ("lavas"), kaj la trian parton la Objekto ("la ŝtonon"). Ankaŭ ekzistas kvara parto, la Adjekto ("sur la marbordo"). (daŭrigota) **Marcel Leereveld.**

Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE



Surhavu vizaĝmaskon.

Unu terno povas elŝpruci ĝis 8 metroj.

<https://twitter.com/i/status/1245591199034929153>

Homoj protektas aliulojn per la surporto de masko

Protektilo por la **surportanto** sed ankaŭ por la **proksimuloj**

Roger Springer



Post du semajnoj la 500a eldono estos elsendota.

Skribu al AE dum ĉi tiu grava tempo.

Roger Springer



(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917)

M a l s a t a j J u ĝ i s t o j .

MERITI AŬ NE ?



Ĵussemajne mi menciis kelkajn ekzemplojn de stultaĵoj diritaj de konataj juĝistoj dum ilia juĝado. Mi pridemandis ankaŭ, ĉu la verdiktoj de juĝistoj estas akceptendaj se pli alta efektive aŭ ne povas deklari ke ĝi estas neakceptinda ĉar neĝusta. La defendanto devus almenaŭ ricevi la kostojn por la unua, neĝusta, verdikto.

La punsevereco devas rilati al kaj dependi de la krimsevereco. Sed tiu regulo estas ĝenerale komplete malobeata de la juĝistaro. Jen la kazoj:

1). Oni principe ne povas punati por la fakto ke la suferinto "sentas" la krimon pli akre ol alia suferinto, nek pli severe ol alia persono kriminta en samaj cirkonstancoj, nek por siaj karaktero kaj filozofio, nek dufoje por la sama krimo, nek por krimo ata de alia persono. Tamen en Aŭstralio tio ofte okazas, pro la "homa" malobjektiveco de juĝistoj aŭ pro ilia malklereco la punsevero estas, ne pro la speco kaj severeco de la krimo mem sed por personaj cirkonstancoj (da kiuj ekzistas multaj diversaj ekz. socia pozicio, malsameco, aĝo, samfamilianoj, invalideco), ekz. la mortigo ante policanon aŭ politikiston estas konsiderata, kaj punata, pli severe ol ante "ordinarajn" homojn.

2). La de la juĝisto fiksita longeco de enkarceriĝo estas normale mallongigita poste (en si mem jam nelogika kaj kontraŭjusteca ago), meze per la duono. La krimulo tamen restos pli, kelkfoje multe pli, longe en la karceriĝo se la karceroficistoj juĝas lin/ŝin malbone kondukanta. Ŝi/li do estas punata pro karaktero aŭ vivkoncepto.

3). Ofte juĝisto punas krimon pli severe se la krimanto jam krimis antaŭe; li/ŝi do punatas ree (= dufoje) por sia antaŭa krimo.

4). Ofte juĝisto donas pli severan punon por averti kaj timigi eventualajn postajn krimontojn de simila krimo: oni do ricevas punon (la ekstraĵon) nur por eventualaj krimoj de aliaj personoj.

Konsekvence ne estas strange, ke mi sentas min tute ne sendanĝera, en ĉi tiu mia "nova" lando Aŭstralio (post elmigrado el Nederlando en 1952) se iam mi aŭ miaj samfamilianoj aŭ

Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE

amikoj alvenos, kulpaj aŭ iomete kulpaj aŭ nekulpaj, en la manaĉoj de la nefidinda juĝistaro aŭstralia.

Marcel Leereveld.

LINGVA DIVERSECO .

La lingvoj en la mondo havas tre grandan diversecon inter si. Kelkaj homoj eĉ ne konscias nek kredas, ke en aliaj kontinentoj oni havas lingvojn, kiuj diras la samon kiel la eŭropanoj sed en tute malsamaj formoj neimageblaj de la eŭropanaj. Ekzemple ili povus renkonti afrikan lingvon kiu por nia *"I would travel to Namibia if I had the money"* diras "Namibio se mono estas eble kun mi mian viziton ricevi -us sed la mono ne loĝas ĉe mi". Ĉar Zamenhof faris Esperanton en la komenco precipe por la eŭropanoj, li adaptis la gramatikon de sia lingvo al tiu de la eŭropaj lingvoj. Tio estas unu kaŭzo kial ni trovas nian lingvon tiom facila. Sed la gramatiko de la eŭropaj lingvoj ofte ne taŭgas por lingvo kun logikaj reguloj. Tamen Zamenhof kreis Esperanton preskaŭ tute kiel eŭropa lingvo, por fari Esperanton facile lernebla. Konsekvence ĝi ne estas facila lingvo por multaj aliaj popoloj, ekz. la ĉinoj. Tio ne neniigas la fakton, ke eŭropa lingvo ofte esprimas la transigatan bildon pli ekzakte kiel pluraj neeŭropaj lingvoj. Malgraŭ tio eŭropano trovas ofte malfacila lerni alian eŭropan lingvon, ĉar ili ĉiuj evoluis malsame kun malsamaj vortoj kaj malsamaj esceptoj al la gramatiko.

Gramatikaj reguloj kiuj estas pli-malpli samaj aŭ similaj en ĉiuj eŭropaj lingvoj estas, ke ili parolas en frazoj kaj ke la frazoj konsistas el frazpartoj kiuj havas malsamajn gramatikajn funkciojn en la lingvo. Ili ĉiuj distingas inter substantivoj kaj verboj kaj adjektivoj k.t.p. Ankaŭ la t.n. verbsistemo estas universa, tamen kun kelkaj gravaj esceptoj. Zamenhof prenis sian gramatikon el precipe la eŭropaj lingvoj, sed devis decidi ĉe malsamaj. Por ne konstrui Esperanton tro malfacila por la eŭropanoj, li kelkfoje uzis mallogikan regulon, dolĉigante tion per la uzo de reguloj sen esceptoj. En la verbsistemo, li uzis la logikajn regulojn havi unu vorton por unu ago en plejmultaj kazoj, escepte por la Pasiva Voĉo, kie li uzis la duverban formon de pluraj eŭropaj lingvoj: "La viro BATAS", sed "La hundo ESTAS BATATA". Kie Zamenhof uzis la unuverban formon, estas ĉe la Futuro, kie li kuraĝis krei "Ni MANĜOS kune" anstataŭ ekz. la angla *"We SHALL EAT together"*.

Marcel Leereveld.



Datrevena dolĉaĵo

Gratulojn al Roger pro 9 jaroj da laborplenaj eldonoj. Kaj AE-497 precipe plaĉis. Aldone al la pensprovokaj artikoloj de Marcel estis ankoraŭfoje malsama bildeto de vizaĝmasko kun la kutima admono de Roger, la *Estu Kreema* kontribuo de Franciska, la novaj aldonoj al la Springer domo (ĉu vi vidis la melopsitako-kontrabandaĵon sur la vestdrato? 😊), la informo pri la ekspozicio en Kroatio - espereble en iu onta eldono ni povos vidi kelkajn akvarelojn de la patrino de Nicole, kaj finfine la alineo kiun sendis Peter Danzer...*la vivo estas unu tago kaj ĝi nomiĝas HODIAU!*. Al nia kara eldonisto kaj ĉiuj kontribuantoj, elkorajn dankojn. **Vera Payne**



La du kontribuaĵoj de Katja Steele

Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE

INTERKULTURA NOVELO-KONKURSO (INK), DE AKADEMIO LITERATURA DE ESPERANTO, SUB AŬSPICIO DE UEA

Dum la [solena fermo](#), envere la [Printempa Inaŭguro de la Monda Festivalo de Esperanto](#), okazis la lanĉo de Interkultura Novelo-konkurso (INK). INK estas organizata de Akademio Literatura de Esperanto (ALE) kaj aŭspiciata de Universala Esperanto-Asocio (UEA) kun subteno de la Komisiono pri Belartaj Konkursoj. La konkurso celas instigi aktualan novelan kreadon de aŭtoroj el diversaj kulturoj pri la temo "KOVIM-19: Kiel ĝi ŝanĝis nin" - sama temo, malsamaj vidpunktoj, malsamaj historioj.



La temo de la konkurso estis elektita post reta publika voĉdonado organizata de la montreala LKK antaŭ la Virtuala Kongreso. La prezenton de la konkurso kaj ties regularon oni povas trovi ĉe la retejo de ALE per [akademio-literatura.org/ink](#) aŭ [mallonge.net/INK](#). La teksto-proponoj devas havi maksimume 12 000 karaktrojn (proksimume 6 paĝoj). Ne estas minimuma longeco. Aŭtoroj povas sendi proponojn ĝis la 20-a de junio 2021 (sama tago, kiu markis la inaŭguron de MondaFest' 2020) per specifa sendo-formularo de la konkurso, trovebla ĉe ALE: [akademio-literatura.org/ink/sendoformularo](#). Proponoj devas nepre esti en Esperanto, neniam antaŭe publikigitaj, tamen ne nepre originale verkitaj en Esperanto: tradukaĵoj el aliaj lingvoj bonvenas, kio faras el INK interesan ilon por informi pri Esperanto al neesperantistaj verkistoj.

Interkultura ĵurio taksos la novelojn. La gajnintoj estos anoncitaj dum la 107-a Universala Kongreso de Universala Esperanto-Asocio en Montrealo, en 2022. La 1-a, 2-a kaj 3-a premioj estos respektive 500, 300 kaj 200 eŭroj. Informis **Katja Steele**



La Internacia Fervoja Unio (UIC) uzas Esperanton

UIC (*Union Internationale des Chemins de Fer*) prizorgas la terminologian projekton *RailLexic*. Ĝia reta vizaĝo *RailLexic Online* havas novan aspekton. La UIC-Terminologia Grupo ekipis *RailLexic Online* (RLO) per moderna interfaco celante pli bone servi al la UIC-membroj kaj la sektoro fervoj-ekonomia. La ĉefa misio estis konsiderinde plibonigi la praktikan aliron flanke de la uzantoj, redaktantoj kaj kontribuantoj. La fervojista vortaro de UIC: la unua-ranga leksikono *RailLexic Online* ofertas pli ol 11.000 fervojajn nociojn, prezentitajn en 23 lingvoj, inter kiuj Esperanto. La pliaj lingvoj subtenataj estas la angla, araba, ĉeĥa, dana, finna, franca, germana, hispana, hungara, itala, japana, nederlanda, norvega, persa, pola, portugala, rumana, rusa, serba, slovaka, sveda kaj turka.

Nia propra faka asocio IFEF de jaroj havas aktivan terminologian sektion, kiu produktis mem plurajn kelklingvajn fervojistajn terminarojn. Informis **Katja Steele**



<file:///C:/Users/User/AppData/Local/Microsoft/Windows/INetCache/Content.Outlook/2QZFHM9W/untitled-2.html>

TRADUKKONKURSO "LUCIJA BORČIĆ" kaj INTERNACIA FOTO-KONKURSO POR ESPERANTISTOJ "KROATIO DE VIA OKULO" informis **Heather Heldzingen**



Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE



Granda ŝipo vojaĝas sur la maro apud la marbordoj de Rusujo, Ĉinujo, kaj Irano
<https://www.greenvillepost.com/2020/09/25/provocation-on-the-high-seas-u-s-naval-adventures-near-the-shores-of-russia-china-and-iran/>



Falsa Flago Politika aŭ milita ago farita tiel, ke ĝi ŝajnas esti plenumita de partio, kiu fakte ne respondecas. Uzata por pravigi estontajn militajn aventurojn.



La interreto montras multajn falsajn flagajn agojn.. Ne kredu ĉion oni diras al vi. Uzu vian cerbon. Uzu la interreton Subtenu pacon.

Se la faktoj ne ŝajnas ĝustaj eble ili ne estas veraj **Roger Springer**



3ZZZ

En la ĉi semajna elsendo eblas aŭdi la nuanclenan voĉon de Miguel Fernandez , kiu deklamas la poemon “ Pensi Afrikon”,filozofii kun René Descartes aŭ ekscii kiel infanoj vidas siajn geavojn



Franciska Toubale



Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE